Alvoko al elektroteknikistoj. — *A. E. Korpela* ........ 15
Ĝustigo. — *R. Haferkorn / E. Wüster* ........ 15
Nekrologo por Prof. D-ro Giorgio C a n u t o ........ 16
Nekrologo por Prof. D-ro Hugo S i r k. — *R. Cech* ........ 16
Nekrologo por S-ano Luis H e r n á n d e z ........ 17
Gratulo al D-ro Nicola M i n n a j a ........ 17
Preskaŭ modela poresperanta agado de geodeziistoj. — *B. Popoviĉ* 18
Imitinda ekzemplo ........ 19
Alvoko al amatoraj astronomoj sur la suda duonsfero — *K. Kordylewski* ........ 19
Esperanto en *„Quaestionarium Medicum"* ........ 20
Ebloj kaj malfacilaĵoj por interplaneda vojaĝo. — *B. Popoviĉ* ...... 21
Kompletigoj kaj perfektigoj de la „Terminaro pri la ekstera morfologio de la florhavaj plantoj" laŭ notaĵoj de ĝia aŭtoro ........ 34
Iel kaj iom. — *C. J. Adcock*, kun komento de *H. A. de Hoog* ........ 36
Statistika tabelo de l' Esperanta vortaro. — *Paul Ciliga* ........ 38
La Vortspecoj de la subjekta predikativo kaj de la pasiva participo. — *R. Linse* ........ 45
Insektoj kontraŭ insektoj. — *Lu Chin-sheng* ........ 48
Bibliografio kaj recenzoj ........ 49
*Gaston Waringhien:* Lingvo kaj Vivo. — *W. P. Roelofs* ........ 49
*Tibor Sekelj:* NEPALO malfermas la pordon. — *W. P. R.* ........ 62
*Leander Tell:* La bela subtera mondo. — *W. P. R.* ........ 62
*Kenneth G. Linton:* Kanako el Kananam. — *W. P. R.* ........ 63
Kie abundo estas malofta kaj manko pli malofta - DANIO. — *Leo Søgaard-Hansen* ........ 65
MANNTALID 1703 (Popolnombrado en Islando en 1703). — W. P. R. ........ 65
*Colette Llech-Walter:* Ekzistencialistaj Herooj en la literatura verkaro de J. P. Sartre. — *W. P. R.* ........ 65
*Marjorie Boulton:* EROJ kaj aliaj poemoj. — *W. P. R.* ........ 66
*Marjorie Boulton:* Virino ĉe la landlimo. — *W. P. R.* ........ 68
*Castro Alves / L. H. Knoedt:* Elektitaj poemoj. — *W. P. R.* ...... 69
*Kumbel:* Gruk. — *W. P. R.* ........ 70
*Sofoklo / D. B. Gregor:* Reĝo Edipo *kaj* Antigona. — *W. P. R.* ... 71
*Baldur Ragnarsson:* Ŝtupoj sen nomo. — *W. P. R.* ........ 73
*Reto Rossetti:* Pinta Krajono. — *W. P. R.* ........ 74
*Eli Urbanová:* Nur tri kolorojn. — *W. P. R.* ........ 74
*John Francis:* Vitralo. — *W. P. R.* ........ 75
*Edmond Privat:* Junaĝa Verkaro. — *W. P. R.* ........ 77
*W. A. Gething:* Essential Esperanto. — *W. P. R.* ........ 78
*G. A.* kaj *D. T. Connor, W. Solzbacher,* kaj *J. B. Se - Tsien Kao:* ESPERANTO, The World Interlanguage. — *W. P. R.* ........ 80

061.22(ISAE).055.5 „1959"
*5(06)ISAE „1959"*



# RAPORTO PRI LA AGADO DE I.S.A.E. EN LA JARO 1959

Fine de la jaro 1958 la landaj filioj kaj individuaj membroj elektis la unuajn komitatanojn laŭ la nova Statuto de ISAE. En la *Komitato* estis elektitaj: prof. d-ro H. S i r k (Aŭstrujo), d-ro P. N e e r g a a r d (Danlando), inĝ. A. B r o i s e, inĝ. P. T o u r o n (Francujo), d-ro V. H a p p a c h, inĝ. A. W a r n e r (Okc. Germanujo), E. T u d e l a F l o r e s (Hispanujo), prof. d-ro S. N i s h i (Japanujo), prof. d-ro B. P o p o v i ĉ, d-ro M. B. K o s t i ĉ (Jugoslavio), d-do G. F. M a k k i n k (Nederlando), C. S t ø p - B o w i t z (Norvegujo) kaj inĝ. D. A. M c G i l l (Novzelando). Mankas ankoraŭ la komitatanoj el: Belgio, Britujo, Finnlando, Italujo, Meksikio, Svedujo kaj Usono. Krom ili al la Komitato apartenas: inĝ. R. H a f e r k o r n, gvidanto de Terminologia Centro, kaj d-ro W. P. R o e l o f s, redaktoro de Scienca Revuo. La Komitato krome alelektis prof. W. E. C o l l i n s o n, por ke oni kandidatigu lin por la prezidanteco de ISAE.

Komence de la jaro 1959 la Komitato elektis la *Estraron* por dujara periodo: Prezidanto W. E. C o l l i n s o n, vicprezidantoj C. S t ø p-B o w i t z kaj. P. N e e r g a a r d, ĝenerala sekretario B. P o p o v i ĉ, estraranoj H. S i r k kaj R. H a f e r k o r n. La posteno de la sekretario-kasisto restis ankoraŭ vakanta, ĉar neniu komitatano kandidatiĝis por ĝi, pro kio la ĝenerala sekretario daŭrigis funkcii ankaŭ kiel sekretario-kasisto (denove provizore!).

*Landaj flioj* funkciis en Francujo, Germanujo (okc.), Japanujo, Jugoslavio kaj Nederlando. Neniu nova filio estis organizita. Klopodoj organizi filiojn en orient-eŭropaj landoj estas ĉesigitaj pro plena nerespondo de la eldonisto al ĉiuj plendoj pro neplenumo de la farita interkonsento sendi la revuon al ĉiu membro por kiu ISAE garantias la pagon. En Aŭstrujo, Brazilo, Danlando, Finnlando, Hispanujo, Italujo, Meksikio, Norvegujo, Novzelando, Svedujo, Urugvajo kaj Usono funkciis la *delegitoj* kaj en Belgujo kaj Britujo nur la *perantoj*.

En la pasinta jaro ISAE havis 403 *membrojn* en 23 landoj, nome Argentino 3, Aŭstrujo 38, Belgio 6, Brazilo 2, Britujo 19, Danlando 17, Finnlando 9, Francujo 48, Germanujo (okc.) 44, Hispanujo 16, Italujo 14, Japanujo 24, Jugoslavio 39, Meksikio 7, Nederlando 48, Norvegujo 15, Novzelando 5, Svedujo 10, Urugvajo 4, Usono 20, rekte ĉe la eldonisto kaj pere de UEA (el diversaj landoj) 15. La malkresko devenas precipe pro Britujo, kie post ĉesigo de la aktiveco de Brita Esp. Sc. Asocio ni havis grandan membroperdon. La stato povus tie pliboniĝi nur se ni trovus konvenan membron kiu transprenos la delegitan taskon. Kelkaj eksiĝoj en aliaj landoj koncernas precipe membro-abonintojn, nekontentajn pri enhavo kaj neregula aperado de la revuo.

La kontakto de la sekretariejo kun la delegitoj ne ordiĝis tiom kiom ni esperis en la pasintjara raporto, ĉar la provizora sekretario-kasisto ne havis sufiĉan tempon por unuope instigi nesufiĉe kontaktemajn